

SE ĈIU EKAGOS KAJ PER
SIAJ FORTOJ LABOROS, NI
VENDS AL NIA CELO



1977/6



LA SKOLTA MONDO

Limtempo por manuskriptoj kaj anoncoj:
1-a de Februaro, Majo, Aŭgusto kaj de
Novembro.

REDAKCIO: N-6500 KRISTIANSUND

NE ISSN 0037-6558



S ☆ E ☆ L

SKOLTA ESPERANTO LIGO

Postbus 433

Zaandam Nederlando

Poŝtgirkonto 54.36.47

Fondinto "Avoto", A.W.Thomson.
Kunfondinto: J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj:

Avoto, Norman Booth, D. H.
Davis, L. J. VanGulck.

Prezidanto: John Berggren,
Brattvollveien 23c, Oslo 11
Norvegujo. Tel. 02-283035.

Sekretario: J. K. Hammer,
Taxusstraat 7, Zaandam-1400
Nederlando. Tel.075-166931.

Kasisto kaj Administranto de
"La Skolta Mondo": David H.
Withey, 21. Brookfield
Avenue, Waterloo, Liverpool
L 22 3ye, Britujo. Tel.
051-928-2936.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach
Bamleveien 2, 3700 Skien,
Poŝtgirkonto 8030413, Tel.
035-21848.

Membroj de la Centra Komitato:
Allan Fineberg, 76 Sev-
enteenth Av., Paterson, NJ-
07531, Usono.

Ŝindo-Seitaro, Nisi-mikuni
1-tyôme 200, Higasi-yodogawa
-ku, Osaka-si, Japanujo.

La Skolta Mondo aperas kvarfoje
en la jaro.

Okaze de nericevo, bonvolu in-
formi la Nacian Reprezentanton
aŭ la Administranton.

Kotizojn oni prefere pagu al la
Nacia Reprezentanto. Se tia ne
estas en la lando, prefere al
la Kasisto!

JES

ankaŭ la dua numero de 1977
aperas.

Mi finredaktas ĝin en liberaj
momentoj tuj antaŭ mia foriro
al la nova loĝloko, kaj sendos
ĝin al la presisto antaŭ mia
forvojaĝo. Ĉar la ekspedado
nun okazos en Anglujo, kaj ne
dependos de mi, vi ricevos la
gazeton sufiĉe ĝustatempe.


Sed la redaktado donis al mi
pli ol ordinare problemojn:
Eĉ malpli ol kutime mi ricevis
materialon de aliaj fontoj.
Feliĉe estis en mia tirkestoj
kelkaj paperoj, inter kiuj la
fabelo de Irja Klemola.

Nun mi denove petas alsendon
de materialo, se via kontribuo
ne tuj aperos, tamen ĝi estas
utila! Sed atentu la adreso-
ŝanĝon.

En la tirkestoj ankaŭ kuŝas
multaj fotoj. Se iuj deziras
rericivi fotojn alsenditajn -
bonvolu peti ilin, priskribu
ilin aŭ indiku en kiu numero
ĝi aperis. MI NE POVAS MEMORI
AL KIU APARTENAS LA BILDOJ!
Al la presisto ili ja iras en
via letero, kaj povas pasi iu
tempo antaŭ ol mi rericivas
ilin.



la fabelo pri eta, griza birdo



- Nun, hodiaŭ vespere mi rakontas al vi mian plej belan fabelon, diris Dormfeo ek-sidinte apud la lito de Mirja. Mirja rigardis lin kun miro kaj scivolo en siaj klaraj okuloj. - Sed, kara Dormfeo, ŝi diris, viaj fabeloj estas ĉiam belaj.

Dormfeo ridetis ŝerceme: Jes. Estu tiel, mia karulino, sed nun mi rakontos al vi mian plej belan fabelon, diris li, karesante la blondan hararon de Mirja. - Eta knabino, kiu havas same orbrunajn okulojn kiel vi, diris foje, ke en la fabelo estas poemo kaj politiko. Rapidu nun por dormi, por ke mi povu komenci.

Rapidege Mirjam demetis veston, belete ordigis ĝin sur la seĝo kaj saltis en sian liton. - Jes, kara Dormfeo, nun vi povas komenci, ŝi diris aminde ridetante.

Sed Dormfeo ne komencis tuj. Ne. Meditante li rigardis eksteren tra la malgranda fenestro de la ĉambro.

Estis klara kaj malvarmega vintra vespero. Tra glaciaj floroj sur la fenestra vitro inundis lunaj radioj en la ĉambron, ludis ĝojeme sur la kvadratita tabla tuko kaj formis sur la tapiŝo luman kvadraton. Eta kandelo sur la fenestro brulis senfragle. Dormfeo leviĝis por estingi ĝin. Poste li ree sidiĝis ĉe la lito de Mirja kaj ekrakontis.

- La printempo venis tiel bele kaj dolĉe kiel ĉiujare. En la parkoj kaj sur la kortoj de la malnova urbo la herbo ĝermis, la humo spiris mole kaj freŝe, kaj la burĝonoj de la floroj kaj arboj ŝvelis.

En la blanka konstruaĵo apud la venda placo de la urbo solenis studentoj alvenon de printempo. Tra malfermitaj fenestroj sonis ĝis malfrua vespero ĝaja muziko kaj kantado, kaj preterpasantoj povis vidi brilantajn okulojn kaj ridetantajn junajn vizaĝojn.

Guste antaŭ la nokta mezo, la muziko kaj ĝaja babilada bruo ĉesis. Serioze, preskaŭ solene la studentoj enviciĝis kvarope flanko ĉe flanko. Kiam la sonorilego de la Katedralo informis la momenton de la nokta mezo, ili metis sur la kapon sian blankan studentan ĉapelon kaj marŝis eksteren en la printempan nokton. Ĉe la pordi ĉiu ricevis ĵus ekbruligitan torĉon, kaj kantante himnon pri sia propra kara lando kaj hejmloko la studentoj marŝis ritme kaj trankvile kiel torĉa procesio laŭ la stratoj de la urbo.

Sur la stratoj estis multaj rigardantoj. Knaboj kriis kaj fajfis entuziasme, kaj kuris tute proksime de la procesio. Ie kaj tie malfermiĝis fenestroj. Dormeme, mirante, kelkaj eĉ indigne la loĝantoj sin klinis por rigardi la torĉan procesion.

Portante la torĉon alte per sia mano la studentoj marŝis ĉiam kantante trans la mezan ponton kaj posete laŭ la borda strato al la Katedralo. La kantoj resonis klare kaj forte. La torĉoj simbolis la vivantan scion, kiun ili serĉis el preleĝoj kaj aŭditorioj kaj el siaj dikaj libroj, kaj kiun ili post siaj studjaroj volis porti kun si sur

la lokoj, kie ili havos taskon servi sian landon.

La koboldoj kaj la feoj de la borda parko ŝteliris el siaj kaŝlokoj por rigardi, kio okazas. La maljuna koboldo de la Katedralo, kiu estis centojn da jaroj aĝa kaj estis ankaŭ pli multon vidinta kaj spertinta ol iu alia, mankaresis sian longan grizan barbon. Neniam antaŭe li estis vidinta meznokte junulinojn kaj junulojn, kiuj havis blankan ĉapelon sur sia kapo kaj kantante portis torĉaon alte per sia mano. Kaj la koboldo antaŭsentis, ka ree iu nova periodo komenciĝos en la historio de la malnova urbo. Kaj samtempe zorgoplene kaj gaje la koboldo de la Katedralo sendis informon pri la okazo al la estiminda koboldo de la Malnova Kastelo helpe de sia plej rapida monedo.

De la Katedralo la torĉa procezio revenis trans la nordan ponton kaj laŭ aliaj silentaj stratoj al la blanka konstruaĵo apud la venda placo. Ĉe la pordo ili estingis la torĉojn kaj iris internen por daŭrigi la feston.

Iu el la plej unue venintaj, silentema sed samtempe brava studento ne iris internen - Venu kun ni, venu, kriis la kamaradoj gaje al li. - Nun ni ĝojos ĝis la luma mateno.

Kaj kelkaj volis tiri lin internen. Sed li rezistis. Kiam la lasta torĉo estingiĝis kaj muziko kaj kantado denove eksonis tra la malfermitaj fenestroj, li turniĝis kaj rapidis al sia loĝejo laŭ silentaj, mallumaj stratoj.

La loĝejo de la studento estis malalta subtegmeta ĉambreto en ligna domo apud eta parko. Sed pli trankvilan loĝejon por studado neniu povus trovi. La studento malfermis sian etan fenestron por rigardi eksteren en la malluman nokton. La printempa vento susuris en la aceroj de la parko, la strataj lanternoj donis sian lumon obskure, neniu iranto estis sur la silenta strato, sed la tuta freŝa aero estis plena de preskaŭ ne aŭdeblaj melodioj, kiuj rakontis pri revoj, sopiroj kaj deziroj.

La studento rememoris sian promeson, jam antaŭ longe donitan, skribi fabelon por la printempa festo de siaj plej proksimaj geamikoj por la sekvanta vespero. La fabelo ankoraŭ ne ekzistis. Estis nur pensoj kaj bildoj, kiuj naskiĝis kaj malaperis.

Milda zefiro karesis la frunton de la studento. La pensoj kaj bildoj ordiĝis kaj klariĝis. Pli klare ol iam li memoris sian plej karan kamaradon, lin, kiupovis sopiri veron kaj belecon pli profunde ol aliaj, serĉi pli sincere kaj plene, kaj esprimi siajn sopiron kaj revojn en ĉarmaj melodioj. En la ludo kaj en la vero li estis la unua, same kiel en la ekzamenoj, kaj la plej bona en la rondo de la amikoj. La antaŭan printempon post la printempa festo de la studentoj, la amikoj portis lian ĉerkon al la silenta tombejo de la malnova urbo. Kaj li, kies vivo estis tiel riĉa kaj tiel plena da promesoj, ne plu ekzistis, restis nur memoroj kaj tomba teraltaĵo kovrita per floroj.

Super la dormanta urbo brilis la steloj klare kaj trankvile. La studento sentis sur sia frunto la mildan zefiron, li fermis siajn okulojn por momento. Sajnis al li, ke en siaj pensoj li vidis sian amikon kiel vivanta apud si, ĝuste tia, kia li estis kiam ili la lastan fojon interrenkontiĝis, kun klara brilo en la malhelaj okuloj, en la voĉo io fremda kaj samtempe ĝoja, kiam li rakontis, ke li estis trovinta simple kaj bele kaj mirinde la veron kaj belecon, kiun li jam tiel longe serĉis.

Kiam la aceroj denove elburĝoniĝos en la parkoj kaj en la tombejo de la malnova urbo la studento faros ekskurson al la tombeto de sia amiko. Verŝajne la sama eta birdo, kiu kantis en acero dum la tombo estis ŝovele plenigata, ree eksonigos siajn mallongajn ĝojplenajn trilojn.

- Nun mi scias kion rakonti en la festo morgaŭ vespere, diris la studento al si mem. - Mi rakontos la fabelon de griza birdeto.

Kaj li eklumigis sian lampon kaj sidiĝis apud la tablon por skribi.

La plumo moviĝis kiel per si mem sur la papero. Cio estis preta en lia menso, kiel serio da bildoj, kaj malantaŭ la bildoj desegniĝis lia mortinta amiko, li, kiu sopiris tiel profunde kaj serĉis tiel sincere.

La sekvantan vesperon la studento rakontis sian fabelon, la fabelon pri eta, griza birdo, en la festo de siaj amikoj. Li estis tute simpla studento, li malsukcesis ofte en ekzamenoj, li devis multege labori por fari ilin pretaj. Sed en tiu vespero li per sia fabelo okupis siajn aŭskultantojn. En sia propra menso estis ekflaminta la sama sopiro, pri kiu li rakontis, kaj nesciante li insistis deziris foje esti ĉe la celo, ankaŭ li.

Dormfeo silentis.

Nuboj nevidebligis la lunon. La eta ĉambro estis tute malluma.

Per sia orela fingreto Mirja karesis la manon de Dormfeo.

PARDONFETO !

Pro miskompreno ĉe la presejo la ekspedado de la Aprila - Junia
numero de LSM estas tre malfrua.

Pri tio nur mi respondecas kaj mi petas vian pardonon!

David Withey. September 1977.

- Ĉu la fabelo finiĝis, Dormfėjo? ŝi demandis. - Vi ne multe rakontis pri la griza birdeto.

- Ankoraŭ ne, mia kara, diris Dormfėjo. - Mia plej bela fabelo nun komenciĝos, kaj vi komprenas, ke ĝi ne estas mia fabelo, sed la fabelo de la studento.

Mi aŭdis ĝin multfoje. Unuan fojon en aŭgusta nokto sur la balkono de soleca konstruaĵo, la aŭskultantoj estis tute junaj knabinoj. La steloj brilis tiel klare, kiel ili ĉiam brilas en aŭgusta nokto. Malantaŭ la parko de la domo fluis larĝa rivero, ie malproksime kantis akvofalo. La nokto estis plena da atmosfero de la fabelo. La lastan fojon mi aŭdis ĝin en marista preĝejo proksime al granda, brua havenurbo. Kamarado de la studento rakontis ĝin al vent-

morditaj, krudaj maristoj per ilia propra gepatra lingvo, kiun ili dum longa tempo ne aŭdis. La rakontanto mem estis survoje al lando situanta aliflanke de Ekvatoro. Lia celo estis tie resti por rakonti al nigraj homoj pri Kristnasko kaj ĝia neeldireble granda donaco. Li povis bonege rakonti, kaj la maristoj aŭskultis silenteme kaj serioze.

Dormfėjo silentis mallongan momenton. Poste li daŭrigis:

- Inter imponaj per neĝo kovritaj montoj kuŝis belega valo. La montoj ŝirmis ĝin de la ventegoj, la ĉielo volbiĝis super ĝi bele kaj milde, la suno malŝparis al ĝi siajn plej varmajn radiojn. Nenie la herbaj kampoj estis tiel verdaj kaj la floroj tiel belaj kaj la arboj tiel bonkreskaj kiel tie.

Tra la valo fluis klarakva, profunda rivero al la maro. Ĝi fluis ĉiam senvente kaj serene spegulante en sia surfaco la ĉielon, imponajn montojn kaj bonkreskajn bordojn.

Se oni en somera vespero, kiam la neĝokovritaj montosuproj ardis en la lastaj radioj de la subiranta suno, lasis sian boaton gliti sur la rivero kaj rigardis la surfacoon de la akvo, plenigus ankaŭ la plej maltrankvilan menson tiel granda kaj mirinda paco, kiun nur la paco de la eterneco povas doni. Kaj dum la klaraj noktoj, kiam la ĉielo kun siaj milaj steloj speguligis sin sur la akva surfaco, kaj la tuta regiono dormis trankvile, estis kiel ne plu ekzistus la tempo kaj la limoj.

En arbareto proksime al la rivero loĝis la etaj kantantaj birdoj de la valo. Ĉiam printempe ili konstruis siajn nestetojn kaj somere prizorgis siajn idojn kaj kantis siajn kantojn. Ili kantis pri la printempo, kaj la loĝantoj de la vala vilaĝo diris, ke ili sciis kanti ankaŭ pri iliaj pensoj.

Foje, en la plej ĉarma printempa sezono eta griza birdo kantis pli bele ol ĉiuj aliaj birdoj de la valo.

Ĝi komencis sian kanton, kiam la unua tagiĝo ekflametis, kaj kantis kaj kantis ĝis la mateno fariĝis plena tago. Kaj kiam la suno subiris malantaŭ la montoj, ĝi komencis sian arion denove, kaj kantis kaj kantis ĝis la lasta vespera ruĝo estingiĝis sur la plej altaj suproj, kaj en ĝiaj arioj sonis la tuta senesprimebla ĝojo kaj sopiro de la printempo.


- Aŭdu, aŭdu, diris la homoj de la vala vilaĝo unu al la aliaj. - Aŭdu la etan kantiston de la arbaro. En ĝiaj arioj estas ektintato de la anĝelaj harpoj.

Sed la birdeto kantis nur pri tio, kio en ĝia propra brusto sonis kaj trilis, kaj ĉiutage ĝi senripoze flugadis tien kaj reen serĉante arbon sur kies branĉoj ĝi povus sendanĝere fari sian neston.

En iu ĉarmega printempa tago sovaĝa pomarbo sur la rivera bordo elburĝoniĝis. Kiam la eta birdo preterflugis ĝin, etendis la arbo siajn branĉojn, plenplenajn da odorantaj floroj.

- Venu ĉi tien, venu, la pomarbo flustris. - Nenie vi povas trovi pli ĉerman kaj trankvilan lokon por via eta nesto.

Neniam antaŭe la birdeto estis vidinta ion tiel ĉarme belan kiel la pomfloroj kaj la ĉiela bluaĵo. Gojegante ĝi haltis sur la floranta branĉo kaj agordis iun de siaj plej ĉarmaj arioj.



Kiam venis la krepusko, ĝi klinis sian etan kapon sur la flugilon kaj ekdormis. Frue en la sekvonta mateno ĝi portos la unuajn etajn pajlerojn por sia nesto.

En la nokto la birdeto vekiĝis. La rivero kirlis kviete. La floroj de la pomarbo odoris. El la plej unue burĝoniĝintaj floroj jam falis petaloj. Falanta petalo tuŝis la flugilon de la birdeto, kaj la birdo suprenrigardis al la branĉo, de kiu la petalo estis falinta, kaj vidis tra ĝiaj ankoraŭ ne plenkreskaj folioj malproksimajn stelojn. La steloj trembrilis klare kaj invitante, kaj la birdeto subite komprenis, kiel rapide la beleco de la pomarbo estos pasinta, kaj ĝiaj folioj tiel densa, ke ĝi ne plu povos vidi stelojn de la ĉielo. Kaj en la birdo vekiĝis sopiro ien pli malproksimen kaj pli alten, for el la milda vala trankvilo.

Kiam venis mateno, la birdeto ekflugis. Ĉirkaŭ ĝi en bluaj vastaĵoj flustris kaj subkantis la printempo pri la libereco kaj la forto. Per rapidaj flugilbatoj la birdo leviĝis ĉiam pli alten. La limoj de la arbaroj kaj kampoj sube en la valo malaperis, la rivero brilis kiel arĝenta rubando, en la horizonto brilis la maro, sed ĝi flugis plu pli alten.

En betularo sur monta deklivo ĝi fine haltis. Ĝi estis laca. Ĝi eksidis sur blanchanta betulaj branĉoj kaj rigardis ĉirkaŭen. La novaj printempaj folioj de la betulo reflektiĝis en radioj de la vespera suno. Blankaj anemonoj kovris la teron ĉe la betulo, la okcidenta vento tute mallaŭte kantis pri la printempa beleco.

La griza birdeto sentis sin neesprimeble feliĉa.

- Restu tie ĉi, birdeto, restu. Sur miaj branĉoj via nesteto povos ŝirmite balanci flustris la betulo.

La birdeto estis ege laca. Momenton ĝi aŭskultis la flustradon de la betulo kaj la afablan susuradon de ĝiaj folioj. Antaŭ ol la suno malaperis malantaŭ la montojn, ĝi klinis sian kapeton sub la flugilon kaj ekdormis. Frue en la mateniĝo ĝi intencis porti la unuajn etajn pajlojn por sia nesto.

En la nokto ĝi denove vekiĝis. Estis tute silente, la arboj kaj la floroj dormis. Sed inter betulaj folioj steloj ĉielaj trembrilis fore kaj alte. Kaj en la brusto de la birdeto denove vekiĝis sopiro ien pli malproksimen kaj alten.

En la tagiĝo la birdeto kantis al la betulo kiel adiaŭo sian plej belan arion, kaj kiam la suno leviĝis, ĝi disetendis siajn flugilojn kaj rapidis for.

En la vespero la birdeto estis sur la plej alta pinto de la montaro, kie ne plu la plej modesta nana betulo povus kreski, kaj nur unuopaj nekonataj alpaj floretoj kaŝe rigardis el musko.

Sur la plej alta supro staris kruco en la lastaj briloj de la maleviĝanta suno.

La griza birdeto sidiĝis sur la transversa trabo de la kruco. La ĉielo volbiĝis super ĝi mirinde kaj senlime. La suno sinkis en la sinon de la malproksime brilanta maro, kaj la vespera trankvilo prenis ĉion en sian posedon.

En la nokto la birdeto denove vekiĝis. Super ĝi volbiĝis la stela ĉielo en la plena brilo. Miloj kaj miloj da steloj radiis kaj trembrilis tiel klare, ke la birdeto preskaŭ devis fermi siajn okulojn.

Pli proksime al la ĉielo ĝi ne povis esti.

Kiam venis mateno ĝi faris sian neston sub la kruco.

Dormfeo silentis. Mirja rigardis lin kun demandoj en siaj orbrunaj okuloj.

- Ĉu la studento estas ĉe la celo, ŝi post momento demandis.

- Mi ne scias, respondis Dormfeo. - Ĉiuokaze li estas sur la vojo. Kaj se li serĉas sincere kaj tutkore, foje ankaŭ li estos ĉe la celo.

- Dankon, kara Dormfeo, Mirja flustris kun duone fermitaj okuloj. - La fabelo estis bela, bela: sed viaj fabeloj estas ĉiam belaj, ankaŭ tiaj, en kiuj estas poemo kaj politiko.

Dormfeo ŝteliris for, kaj post momento Mirja dormis.

En la nokto Mirjam sonĝis. Ŝi mem staris sur la monta supro rigardante la krucon. Eta griza birdeto sidis sur la transversa trabo kaj kantadis. Sed la birdo ne estis sola, ĉie apud ĝi estis birdoj, sennombraj birdoj, kiuj trilis saman klaran, ĝojo-plenan arion.

- La studento estas ĉe la celo, flustris iu al Mirja, kaj Mirja ridetis en la sonĝo

Irja Klemola

Paŭlo Balkányi 1894-1977

Post longa malsano, la 25-an de februaro 1977, en Budapeŝto forpasis Paŭlo Balkányi, unu el la plej elstaraj membroj de la hungara Esp.-movado.

Ankaŭ al la Skolta Esperanto-Ligo li faris grandegajn servojn. En la pioniraj jaroj de la Ligo li laboregis senĉese, ne nur kiel Nacia Agento sed mondamplekse por dissemi nian aferon. Li estis ĉefmotoro de la granda jamboreo en Gödöllő. Pacon!




NEGES EWYLLYS DA

Swyddfa'r Urdd, Aberystwyth, Cymru

Ankaŭ en tiu ĉi jaro ni ricevis la "Bonvol-Mesaĝon" el Kimrujo al la tago de bonvolo, la 18an de majo.

La organizaĵo utiligas lingvojn plej diversajn por atingi al la homoj per sia voko pri paco kaj bonvolo, kaj inter la lingvoj estas ankaŭ Esperanto, tiel ke ĝi estas sur la tre granda afiŝo.



18-a EUROPA FERIO-SEMAJNO EN SVISLANDO

okazos de la 4a ĝis la 10a de septembro en Wengen, 1275 m s m Dum la restado okazos diversaj ekskursoj i.a. al montoj kiel Kleine Scheidegg (2061 m s m.) kaj preter la monto Eiger kun sia malbonfama norda rokmuro, Eiger Nordwand. Prezoj ek de 355 svisaj frankoj Aliĝoj al s-ro Ernst Glättli, Laurstrasse 17, CH-5200 Brugg.

BONVENON

Al internaciaj studsemajnoj
en Vääksy 09.-17.7.1977
en Yli-Tornio 13.-18.06.1977



Se vi deziras iri al iu norda lando, Finnlando invitas al kursosemajnoj en Vääksy kaj en Yli-Tornio.

Oni ankaŭ aranĝas studeks kurson al Novgorod la 11an ĝis 14an de aŭgusto.

Vin turnu al Internacia Studcentro, SF 17 400 Vääksy.

"VASTAJ HORIZONTOJ EN INTERNACIA SKOLTADO"

nia kontribuo al la Interliga Programo de la Skolta Movado.



aperis jam en pluraj lingvoj kaj aperos en eĉ pli. Se vi povas utiligi anglan, francan, nederlandan aŭ norvegan - tuj metu Ĝi kostas NUR 1.50 ned. gld inkl. afranko!!!!

UNUA HELPO

Eble vi estas la unua, kiu venas al la loko, kie akcidento okazis. Kaj via helpo - se tuja kaj korekta povas savi vivon.

Je trafikakcidentoj kaj aliaj akcidentoj estas tri ĉefaj kaŭzoj al la morto: sufokado, sangoperdo kaj ŝoko.

SUFOKADO.

Ce trafikakcidentoj ofte okazas sufokado. Same dum dronakcidentoj kaj post elektrizado aŭ koratako. La sufokado estas rapide mortiga, kaj la sekundoj valoras. Se io baras la aerovojojn oni ne plu povas spiri, kaj tre baldaŭ la koro haltas.

Tial tuj kuŝigu la pacienton surdorse dum vi klinas la kapon malantaŭen por ke la lango leviĝu kaj la aero povu libere pasi. Tenu per unu mano sub la nuko kaj levu. La buŝkavernon vi devas unue purigi.



Se la paciento ne spiras aŭ malforte spiras, tuj komencu la spirigon, buŝ-al-buŝe. Per unu mano tenu sub la nuko dum vi metas la alian sur la frunton, kaj per la fingroj kunpremas la nazon. La kapo devas ĉiam esti malantaŭenklinita. Spiru mem profunde, vaste malfermu la buŝon kaj premu viajn lipojn ĉirkaŭ la buŝo de la paciento kaj ekblovu.

Poste porprenu vian buŝon, tiel ke la pulmoj de la paciento povu malplenigi sin, kaj ripetu la agon. La ritmo por plenkreskulo estas 12foje en la minuto - iom pli rapide por infanoj. Albeboj nur malgrandaj blovoĵoj. Daŭru ĝis la paciento mem spiras.

Se la koro haltis, vi povas doni fortan frapon al la brustkesto. Se ĝi ne ekfunkcias pro tio, vi devas komenci korkompresadon. Tio estas ritmaj premoj al la brustosto, unu premo en ĉiu sekundo.

Se kaj la spirado kaj la koro haltis, buŝ-al-buŝo devas kombiniĝi kun tiu korkompresado, kaj du helpantoj estas necesaj. Unu blovas dum unu premas - kaj la ritmo estu unu premo en la sekundo kaj unu blovo post ĉiu kvina premo.

Multaj hezitas komenci tian helpagojn post akcidento nesciante kion fari. La rezulto povas esti tragika. Tial vi - skolto - devas lerni tion antaŭe. Agu kune kun iu, kiu jam lernis la unuan helon - kuracisto aŭ flegisto - en iu patrola kunveno. Vi povas ekcerci per



la speciala pupo. Krome ekzistas specialaj maskoj por tio.

SANGADO.

forta sangado kondukas al la morto - speciale danĝeraj se la pulsantaj sangujoj difektigis. La regulo estas, ke vi tenu la sangantan lokon alte, kaj la sanganto estu trankvila.

Premkovriloj povas haltigi la plej oftajn sangadojn el malfermaj vundoj, samtempe tiu kovrilo protektas kontraŭ infekto. Tial ĉiu skolto kunportu ĉiam konvenan pakajojn - la tielnomitan "unuopulan pakajojn." Ĝi enhavas kompreson sterilan, kiun vi povas meti rekte sur la vundon. Fiksita al ĝi estas bindaĵo per kiu vi povas bandaĝi.

STABILA FLANKA KUŜO.

Se la spirado funkcias, sen -

koncienculo plej bone kuŝu sur sia flanko. La Stabila Flanka Kuŝo montriĝis plej bona por spirado kaj sanga sistemo. Ankaŭ dum transporto sur portilo senkonscienculo devas kuŝi tiel.

Studu la bildojn, kaj vi lernos kiel vi facile povas igi pacienton kuŝi korekte kaj ankaŭ ekzercu tion dum patrola kunveno. Post la lernado, knabo facile povas turni plenkreskulan al la korekta pozicio.

ŜOKO.

La ŝoko povas aspekti tute nedanĝera, sed se vi ne tuj komencas per la preventaj agoj, ĝi povas esti mortiga.


La ŝoko malhelpiĝas se vi kuŝigas la ŝokinton kun la piedoj iom pli alte ol la resto de la korpo. Per tio vi igas la sangon reflui al la koro. Krome estas necese kovri la pacienton per iuj varmaj vestaĵoj, lanokovriloj aŭ similaj aĵoj.

Trankviligu la ŝokinton kaj ne movu lin ĝis kuracisto aŭ ambulanco alvenis, kaj ne donu ion por trinki se la paciento povas veni al kuracisto antaŭ ol pasos 6 horoj.


Vi ne devas esti kuracisto aŭ flegisto por doni unuan helpon adekvatan post akcidento.

Sed vi devas lerni kaj iom ekzerci la unuan helpon.

Nur tiam vi povas, kiam la situacio tion postulas, tuj scii kion fari, agon post ago en korekta sinsekvo, - efektive kaj rapide, ĝis la edukitaj helpantoj venos.




LA LANGO BARAS LA AEROVOJON.



KIAM VI PREMAS LA KAPON MALANTAUEN, VI LIBERIGAS LA AEROVOJON, KAJ LA AERO POVAS PRETER PASI.

Laŭ artikolo en "Speideren" de Øystein Sårheim.



FORD T-modell 1907.

NI RICEVIS:

Manifesto 77 de la Esperanto-Movado.

Tiu manifesto en kvin punktoj por paco en libereco kaj por libereco en paco estas iniciatita de profesoro Ivo Lapenna, kiu petas subtenon de homojen kaj ekster la Esperanta Movado

UN kaj ni, malgranda kajero eldonita de Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de Universala Esperanto-Asocio

NACIAJ REPRESENTANTOJ.

Ni per tiu ĉi mallonga noto deziras esprimi nian dankon al

J.J. de Matos Correia, kiu eksciĝis kiel Naĉia Reprezentanto por Portugalujo. Li mem prizorgis posteulon por la tasko (Kaj tio devus ĉiu NR fari!), kaj ni informos pri ties nomo kaj adreso en venonta numero.

Por Germanujo la situacio estas, ke s-ro Winkler dum kelka tempo devas interrompi sian laboron pro personaj problemoj.

Ni notas ĉi tion, esprimas nian dankon, kaj la deziron baldaŭ reaŭdi pri li, ke la problemoj solviĝis!

DEZIROJ.

La diversaj funkciuloj de nia movado laboras sen salajro. Ili eĉ ne deziras salajron, ĉar la laboro estas interesa, kaj la afero por ili tre valora.


Tamen de tempo al tempo ni povas fari al niaj laborantoj ĝojon, kiu eĉ ne kostas al ni mem ion ekstran! Kial ni ne havu tiom da prizorgemo por ili?

Ni ofte atentigis, ke en plej multaj okazoj bele afrankita letero estas pli valora ol la tro ordinara - ĉar ĉiu el ni almenaŭ konas iun kiu kolektas ilin, kaj ni havas duoblan efikon

- krom doni ĝojon al tiu, ni atestas pri la mondvasteco de nia afero

Nun alia modesta deziro: Se iu el vi skribas al nia sekretario, s-ro Hammer, per bildkarto (eble nur por ŝpari afrankon?), bonvolu elekti bildkarton kun popolkostumo.

La sinjorino Hammer kolektas tiajn kaj vi povas doni al ŝi ĝojon per via poŝtkarto. Kaj sciui: ŝi vere meritas tion!



FILEHOCKO

Ne plu karesu ĝin,
alie ĝi ne foriros!



NACIAJ REPRESENTANTOJ

- Aŭstralio: s-ro H.J.C. Brendel, 3/119 Kadumba Str., Yeronga - QLD 4104
- Aŭstrio: f-ino Eva-Marie Fraunhofer, Badenerstr 7, A-2512 Tribuswinkel/Baden
pr Vieno.
s-ro Franz Schwärzler, Rathausstrasse 2, A-6900 Bregenz.
- Belgujo: s-ro Gert van Damme, Marie Jose-laan 31, B-2600 Berchem. Tlf 031-3035.43
s-ro L.j. VanGulck, Lt.Lippenslaan 33 bus 10, B-2200 Borgerhout.
Poŝtk.to Belga Skolta Esp.Sekretario 000-0327460-85. Telefono
(031)3688.08.
- Brazilio: s-ro Adonis Marcelo Saliba Silva, Av. Olegario Maciel, 274, Apto 1211
3000 Belo Horizonte, MG.
- Britujo: s-ro C.Bardsley, 26 Crossbank House, OL9 6JD Oldham, Lancs.
- Danlando: s-ro Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, DK-2600 Glostrup.
- Finnlando: s-ino Irja Klemola, Nunna, SF-20660 Littoinen.
- Francujo: s-ro Patrick Deveughele, 53 Av.de Rigny, Appt 64, F-94360 Bry sur Marne
- Germanujo: s-ro Georg D. Winkler, Haroldstrasse 47, D-41 Duisburg 1.
- Hispanujo: s-ro S.Aragay Galbany, Bassegoda 40-3-1, Barcelona 14. Tel 333 80 81.
- Irlando: s-ro Frank Dobbs, 8 Ailesbury Grove, Dublin 4.
- Italujo: s-ro Fr. Abriani, Via Falconetto 24, I-37100 Verona. Tel 045-525173.
- Japanujo: s-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K.16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.
- Kanado: s-ro John H.F.Hoyle, Box 421, Forest Ont.
Helpa NR: s-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb.
- Maroko-Agadir: peranto s-ro Emilo Mas, 39 Cite des Oiseaux, Inezgane.
- Meksikio: s-ro Jaime Javier Martinez Tellez, 8a, No 3604, Chihuahua.
- Nederlando: s-ro B.J.Wijmer, Vreebos 41, Zoetermeer/2280. Tel 079-215868. Poŝtkto
3335470
- Norvegujo: s-ro H.A.Rosbach, Bamleveien 2, 3700 Skien. Tel 035 21848.
- Novzelando: s-ro D.B. Pease, 6a Bay Road St Heliers, Aukland 5.
- Peruo: s-ino J.de Skotte, Melecon Paul Harris 335/200 Barranco-Lima 4.
- Portugalujo:
- Svedujo: peranto s-ro Ragnar Hjorth, Kronobergsqg 25, s-11233 Stockholm.
- Usono: s-ro Allan Fineberg, 76 Seventeenth Ave, Paterson N.J. 07513.

Informoj pri membreco:

En landoj kun Nacia Sekcio: Informiĝu ĉe NR kaj pagu al li la kotizon.

Individuaj membroj (nur en landoj sen N.R.): Kotizo inkl. abono:

Junuloj ĝis 18-jaraj: Ned gld 3.30 aŭ egalvaloro.

Pliaĝuloj: Ned gld 5.00 aŭ egalvaloro.

Subtenantoj: Minimume Ned gld 5.00 aŭ egalvaloro.

Prefere pagu la kotizon al la kasisto. Vidu p. 2.

Adresoj de la Centra Komitato: Vidu la duan paĝon.

Konstanta adreso de S.E.L.: Postbus 433, Zaandam, Nederlando.



LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTO LIGO

VOLUMO 5
NUMERO 6

TRIMONATA REVUO.
APRILIO-JUNIO 1977

